

Ni neniam konos la veron

Mi estas nek politikisto nek ĵurnalisto kaj mi formas propran opinion, legante gazetojn, aplikante regulojn logikajn, kaj kelkfoje malkaŝante mensogojn. Kiam okazis teroragoj kontraŭ Usono la 11an de septembro 2001, mi ektimis kaj, kiel milionoj da aliaj, mi min demandis, kiu tion faris kaj kial, kiucele. Poste mi miris, kiel rapide la esplor-instancoj identigis la kulpulojn, kiel rapide ili ĉesis esplori kaj kiel frue, tro frue, ili komencis forigi la ruinojn, malgraŭ tio, ke ne ĉiuj pruv-objektoj, eĉ ne ĉiuj kadavroj aŭ kadavreroj estis kolektitaj.

Iom post iom mi gazete, libre kaj interrete havigis al mi faktojn, kiuj instigis al plia pensado. Pli kaj pli mi opinias, ke oficialaj komunikoj mensogas, trompas kaj nepardoneble insultas la viktimojn, tiel ke du jarojn post la evento ĝi ankoraŭ ne estas kontentige senvualigita.

Sekreta polico

Post publikigo de la nomoj de la 19 suspektitaj teroristoj sin anoncis ses, konstatante, ke ili ankoraŭ vivas, estis nek en Usono nek en unu el la kvar forrabitaj aviadiloj. La saŭd-araba ministro pri eksterlandaj aferoj, princo Saud Al-Faisal, renkontinte la usonan prezidanton Bush, deklaris, ke kvin nomoj neniel estis implikitaj en la fiago. Krome la supozata ĉefteroristo, Muhammed Atta, pli frue trejniĝis en Alabamo, kaj jam de 1999 kaŝobservis lian loĝejon en Hamburgo, Germanio, la sekreta polico. Ankaŭ la germana magazino *Der Spiegel* raportis, ke alia teroristo, Ziad Jarrah, laboris ne nur por la iama orient-germana sekreta servo *Stasi* sed ankaŭ por la federacia germana novaĵservo BND.

Krome notindas, ke post la terorisma atako la usona registaro deklaris ĉiujn pasaĝerojn en la aviadiloj usonaj civitanoj. Honoro? Eble. Sed neniu alilanda instanco nun rajtas partopreni ekzamenadon kaj esploradon de la afero.

Jen alia afero. En junio 2000 la teroristoj Muhammed Atta, Marvan Al-Ŝehhi kaj Ramzi Binalšibh venis kun aliaj araboj al Florido por akiri flugpermeson ĉe lernejo apartenanta al Wallace Hilliard, kies aviadiloj estas uzataj ankaŭ de Jeb Bush, guberniestro de Florido kaj frato de la usona prezidanto. Aliaj araboj trejniĝis ĉe apuda fluglernejo: por ambaŭ varbis Pascal Schreier en Hamburgo. Tamen la floridaj fluglernejoj ne estas menciitaj en raportoj de la usona esploro-servo FBI, malgraŭ tio, ke policanoj konfiskis dokumentojn, kelkajn el aviadilo, en kiu sidis Jeb Bush. Krome unu el la pilotoj, kiuj atakis la usonan ministrejon pri defendado, Pentagonon, laŭdire plenumis komplikan manovron: tamen la gazeto *The Times* raportis la 21an de oktobro 2001, ke la piloto apenaŭ kapablis stiri etan unumotoran flugmaŝinon.

Trankvile daŭrigis sian programon

Kaj kion faris la prezidanto mem dum la terortago? Tuj antaŭe li tranoktis en hotelo nur 20 km for de la koncernaj floridaj flughavenoj. Kvaronan horon post forrabo de la unua aviadilo li forveturis de la hotelo. Tuj post la unua atako kontraŭ la turparo en Novjorko la prezidanto estis informita. Tamen li trankvile daŭrigis sian programon, vizitante lernejon. Eĉ post la dua atako li restis ĉe la lernejo. Nur iom poste li ekparolis publike pri la atencoj. Pli malfrue dum la tago li interparolis kun industriistoj ĉe aer-armea bazo en Nebraska kaj revenis Vaŝingtonon nur vespere.

Kiam antaŭ malmultaj semajnoj aperis glisaviadilo super Frankfurto, Germanio, tuj estiĝis alarmo kaj post nur kelkaj minutoj du RF-4, t.n. fantom-aviadiloj, forakompanis la frenezulon. Tamen kie estis defend-aviadiloj tiaj en Usono la 11an de septembro? Kvankam precize je la horo 08.14 la unua aviadilo neatendite ŝanĝis sian direkton, ĉasaviadiloj enaeriĝis nur je la 08.52 el la bazo Otis en Masaĉuseco. Oni eksciis je la horo 08.56, ke la aviadilo, kiu poste atakos Pentagonon, estas forrabita, sed nur je la 09.30 ekflugis tri F16-maŝinoj de Langley-bazo, 200 km de Vaŝingtono, kvankam nur 15 km for de la usona ĉefurbo situas Andrews-bazo.

Eraraj balotiloj

Tre strangas ankaŭ alia detalo. Ne ekzistas pruvoj pri la eventoj en la piratitaj aviadiloj. Pro telefonvokoj el la flugmaŝinoj oni kredas, ke la teroristoj uzis tranĉilojn kaj rekomendis al pasaĝeroj telefoni hejmen por adiaŭi. Sed la informoj venis unue de Ted Olson, kies edzino sidis en la Pentagon-aviadilo. Interese estas, ke Olson estas Bush-subtenanto. Li estis ĉefadvokato de Bush kaj helpis al li iĝi prezidanto, malgraŭ fuŝitaj kaj neĝustaj balotiloj. Pri la telefonvokoj mem mankas pruvo: ne ekzistas sonbendoj aŭ eĉ indikoj pri la vokoj en telefon-fakturoj.

La mondo ne konas la veron kaj eble neniam ĝin konos. Sed certas, ke la komunikoj de la usona registaro misinformas la mondon, kaj ke restas sekretaj kaj ankoraŭ neklarigitaj ligoj. Mi rekomendas ĉion legi pri la afero kaj poste logike ekpensi ...

Jomo IPFELKOFER

Tasko:

Traleĝinte la artikolon bonvolu respondi al la demandoj, kiujn vi trovas en la sekva paĝo.



Demandoj en Esperanto

1. Pri kio miras la aŭtoro?
2. Kio okazis post la publikigo de la nomoj de la supozitaj teroristoj?
3. Kie akiris flugpermeson la teroristoj?
4. Kion skribas pri tio la raporto?
5. Kion faris Bush, kiam oni informis lin pri la okazaĵoj?
6. Kiam komencis persekuti la ĉasaviadiloj la misvojjigitajn flugmaŝinojn?
Kial estas tio stranga?
7. En kia rilato estas la edzo de la telefoninta vajaĝinto kun la usona prezidento?



Kérdések magyarul*

1. Min csodálkozik a szerző?
2. Mi történt a feltételezett terroristák nevének nyilvánosságra hozása után?
3. Hol tanultak az elkövetők repülőt vezetni?
4. Mit ír erről a jelentés?
5. Mit csinált Bush miután értesítették az eseményekről?
6. Mikor kezdtek üldözni a vadászrepülőgépek az eltérített gépeket?
Mi a furcsa ebben?
7. Milyen kapcsolatban állt a telefonáló utas férje az amerikai elnökkel?

Konsilo*

Estas tute alia tasko respondi al nacilingvaj demandoj ol al esperantlingvaj. Same necesas difini en kiu lingvo ni petas la respondojn. Per nacilingvaj respondoj ni kontrolas la komprenkapablon kaj la tradukkapablon.

Per esperantlingvaj respondoj ni kontrolas ne nur la komprenkapablon, sed ankaŭ la parolkapablon. Ni klopodu malhelpi ke la lernantoj laŭvorte rediru la tekstojn.

Ĉiu tipo havas siajn avantaĝojn, pro tio ni konsilas apliki ĉiujn manierojn alterne, doni prioritaton depende de niaj celoj.

En tiu tasko ni publikigas ankaŭ hungarlingvajn demandojn. Donu al unu lernanto nur unu varianton, aŭ en Esperanto, aŭ en la nacia lingvo.

La antaŭa paĝo estas farita tiel, ke vi povu distondi ĝin.

=====

Aldono de la redaktoro:

Post la publikigo de la ekzerco venis forta kritika reago pri gxi, kies parton ni kopias ankaŭ cxi tien, ja gxi enhavas tre utilajn konsilojn por la uzo:

Citajxo el la uzanta opinio:

Mi ne kontraŭas la fakton, ke Monato publikigis tian artikolon, sed preni ĝin kiel bazon por instruilo aspektas al mi riske, almenaŭ de etika vidpunkto.

Eblas tamen uzi tian tekston en instrua situacio, kondiĉe tamen, ke la **demandoj instigu la lernanton ne nur papage ripeti la starpunkton de la aŭtoro, sed ankaŭ havi kritikan pensadon helpe de demandoj de la tipo:**

- ĉu vi opinias la aŭtoron senpartia?;
- ĉu tia teksto helpas formi al si ĝustan opinion pri la okazintaĵoj?;
- montru senpruvajn asertojn;
- ĉu tia teksto povus aperi en vialanda serioza gazeto?;
- en kio laŭ vi konsistas la plej grava instruo de la teksto?;
- donu de vi konatajn ekzemplojn pri manipulado de la gazetaro fare de registaraj instancoj; k.s.

Marc Bavant, Francio